9e JAARGANG No. 7 VERSCHIJNT MAANDELIJKS 15 JULI 1947

La Progresanto

REDACTIE-COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

SINGULARO - PLURALO

II.

Konsiderante la diferencajn konceptojn, kiujn la naciaj lingvoj havas por singularo kaj pluralo, oni facile komprenas, ke tiuj ideoj neniulingve estas fiksitaj por ĉiam. Okazas ŝanĝoj, preskaŭ neeviteblaj, kiujn unuavice kaŭzas la nekutima plurala finaĵo de t.n. fremdaj vortoj. Ni scias, ke la „fremdaj" nederlandaj vortoj „museum, lyceum, catalogus, crisis" k.a. havas latinan pluralon; „musea, lycea, catalogi, crises", kvankam oni ankaŭ jam parolas pri „museums, catalogussen, crisissen", do kun nederlanda pluralo. Tiu nenederlanda finaĵo restas al ni fremda; ni ne sentas ĝin pluralsignifa. Ne estas do mirige, ke ekzemple la vorto „agenda", kiu origine estis same plurala kiel „musea" fine fariĝis singulara. Kaj el tiu nova singularo oni nun formas la duoblan pluralon „agenda's"!

Tiajn strangaĵojn Esperanto neniam permesas pro sia regula plurala sufikso „j". Ke ni ne sentas la pluralecon de la nomitaj „fremdaj" vortoj pruvas i.a. la fakto, ke analogie al „catalogi" oni parolas ofte ankaŭ pri „prospecti", kvankam la regula pluralo devas esti „prospectussen".

Certe la legantoj jam legis kelkfoje en la literaturo por ni ne kutimajn singularojn kaj pluralojn, kiaj „kanoj" kaj „fazeolo"; por ni, nederlandanoj „riet, bonen". Ankaŭ ĉi koncerne la naciaj lingvoj ĉiu siamaniere uzas, jen singularon, jen pluralon, jen korekte, jen ne. Kaj en Esperanto oni senpense imitas la naciajn formojn. Kial ekzemple ni parolas pri „arboj" (bomen), sed ne pri „grenoj, kanoj", kvankam ankaŭ la lastaj ja konsistas el apartaj vegetaĵoj? Kaj nederlande oni manĝas „kool", sed „bieten", „vis", sed „bonen", „koolraap", sed „knollen"! Ĉu la grandeco de la apartaj objektoj influas? Ne tre, ĉar ni certe ne manĝas efektive betojn, kiuj ĝenerale estas tro grandaj por la manĝo de unu persono. Kaj ekzemple „Brussels lof" ne estas tre granda, kaj krome eĉ ne ekzistas plurale! Kion konsili por Esperanta traduko? Ŝajnas al ni plej bone imiti la naciajn kutimojn, farante esceptojn nur, se oni efektive sentas, ke la nacia esprimo kontraŭas la logikon.

Nomoj de diversaj materioj, el kiuj oni ĝenerale ne atentas la konsistigajn erojn, estas singularaj: „rizo, sukero, sablo", eĉ se tiuj eroj

estas sufiĉe grandaj: „karbo". Sed ni atentu, ke la nederlanda traduko por „karbo" estas plurala: „kolen", kio impresas tiom pli strange, se oni konsideras, ke la parencaj ideoj „cokes" kaj „anthraciet" ne havas pluralon.
Aparte ni rimarku, ke la kutimajn singularajn ideojn „sukero, tabako" k.s. oni uzas plurale por indiki specojn: „diversaj tabakoj" = specoj de tabako.

Kiom ajn logike oni diferencigas en Esperanto diversajn ideojn, ĝenerale ankaŭ singularon kaj pluralon, en iu afero ni tamen perdis la logikon. Origine la pronomo „ci" estas singulara, kaj „vi" plurala. Esperanto tamen dekomence konformiĝis ĉi koncerne al la naciaj lingvoj, kaj ni uzas „vi" same por singularo kiel por pluralo. Ĉu same ni rajtas uzi „ci" ankaŭ plurale? „Ci" tre maloftas, sed niaopinie ne ekzistas prava motivo kontraŭ konsekvenca uzado ankaŭ de „ci" plurale, same kiel en la nederlanda lingvo „jullie" havas singularan kaj pluralan verboformojn.
Internacia estas la kutimo uzi singularon por prezenti pluralan ideon kvazaŭ enkorpigita en unu individuo: „la homo estas racia estulo, la hundo estas fidela besto, la libro estas nia amiko", kvankam ni bone scias, ke ĉiuj homoj estas raciaj k.t.p. Proksimume la samon oni povas diri pri la vorto „ĉiu", kiu estas singulara, sed ampleksas ĉiujn, do pluralon!
Parencaj ekzemploj estas frazoj kiaj: „Infanoj, fermu vian libron! li kutimas lasi la pordon post si malfermita". En la unua frazo oni povas same bone diri: „viajn librojn", sed oni povus tiukaze konjekti, ke ĉiu infano havas pli da libroj antaŭ si. Kaj en la dua frazo ja ne temas pri unu sama pordo. Tamen kutime oni uzas singularon.

Rimarkinde estas, ke la vortoj „io, tio, kio" estas ĉiam singulare uzataj, kvankam la logiko kaj la gramatika regulo permesas pluraligon: „ioj, tioj, kioj". Sed ĉu ankaŭ „ĉioj"?

En la aritmetiko kaŭziĝas ia gramatika embaraso koncerne dividon; ĉu estas pli ĝuste diri „6 dividita per 2" aŭ „dividitaj". 6 estas pluralo, do laŭ tio postulas la „j"-sufikson. Por eviti embarason oni ĝenerale diras: „dividite".

Apartan temon formas la nederlanda kutimo indiki mezurojn, prezojn, horojn k.s. per singularo, kvankam oni uzas pluralon por nomi la mezurunuojn, monerojn, horojn k.t.p. aparte. Ni diras: „het boek kost vijf gulden, het duurde twee uur, de toren is honderd meter hoog", sed: „ik betaalde met vijf guldens, het waren twee uren" k.t.p.

Interesaj estas niaj naciaj kutimoj indiki pluralforme familian nomon, se temas pri la gesinjoroj, ekz.: „de Jansens" (ge-Jansen), kaj por iom kritikmoke indiki personon kun ties samspecanoj, sampartianoj, samtendenculoj: „de Vorrinks".

Dem.: Ĉu bone „sia" en: „tiu artisto estas spegulo de sia tempo", ĉar la signifo de „spegulo" estas verba; sed „lia" en: „tiu hundo estas la amiko de lia mastro"?
Resp.: En ambaŭ frazoj sole ĝustas „sia". La verba uzeblo de „spegulo" neniel influas uzon de „sia". Kaj en ambaŭ frazoj validas nur la simpla regulo, ke la komplementoj „tempo" kaj „mastro" gramatike apartenas al la respektivaj subjektoj „artisto" kaj „hundo".

POR KOMENCANTOJ

H. Kuyt.

Vertalingen voor deze rubriek zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 7. Vertaal in Esperanto:

Het achtervoegsel „iĝ".

's Avonds om acht uur begon de vergadering. Aanvankelijk waren de bijeengekomenen zeer kalm. Maar na een redevoering van een der leden werd de vergadering onrustig. De spreker verweet het bestuur, dat het kasteel wegens het niet verzorgen geheel werd geruïneerd. Na dit verwijt werden enkele aanwezigen woedend. Nu en dan werden scherpe woorden, zelfs beledigingen, gehoord. Eindelijk stond de burgemeester op en begon een geruststellende redevoering. Dadelijk namen de disputen een einde en werd ieder weer verstandig. De burgemeester dankte de deelnemers aan de „leerzame" debatten en sloot daarna de vergadering.

Vertaling van opgave 5.

Kiam mi rericevis[1]) la libron, ĝi estis tre malpura; tial mi purigis ĝin. Post la purigo[2]) ĝi aspektis nova[3]). Miaj vestoj estis tre malsekaj[4]); mi sekigis ilin ĉe[5]) la forno. Post la sekigo mi surmetis[6]) ilin. La maljuna avarulo posedas[7]) amason da mono. Dum sia[8]) tuta vivo[9]) li amasigis[10]) ĝin. Ĉiu havas la rajton[11]) voĉdoni. La registaro rajtigas ilin por tio. La spegulo ne bone pendas tie, pendigu[12]) ĝin sur alian lokon[13]). Post unu pafo la hundo estis morta. Oni mortigis ĝin, ĉar ĝi[14]) estis rabia. En tiu bela regiono[15]) la tempo rapide pasis. Ni pasigis[16]) tie dek tagojn[17]).

1) Niet: *reakiris;* het w.w. *akiri* gebruikt men, als er sprake is van iets, dat met meerdere of mindere moeite of inspanning wordt verkregen, b.v. *akiri diplomon, akiri scion pri...., reakiri spiron.* 2) Ook: *Post kiam mi purigis ĝin;* maar dan vermijdt men het woord *purigo;* waarom het juist gaat. In de vorige zin vertaalde men „schoonmaken" met *purigi;* in deze zin wordt met „het schoonmaken" een zelfstandig begrip voorgesteld, dat men vertalen kan met *purigo,* dus: schoonmaken, reinigen = *purigi;* het schoonmaken, het reinigen = *purigo* (ook: *purigado*). 3) Ook: *kiel nova libro.* Niet: *nove; nova* noemt een kenmerk van het onderwerp *ĝi;* en *aspekti* speelt dezelfde rol in deze zin als *esti* in de zin „li estas kapabla". *Aspekti* is dan ook een variant van *esti,* evenals *resti, ŝajni, fariĝi* enz.; alle zijn koppelwerkwoorden. 4) Niet zonder *j; malsekaj* hoort bij *vestoj,* welk woord in het meervoud staat. Ook: *sekiĝintaj,* hoewel een overbodige lange vorm. 5) Ook: *apud, antaŭ.* 6) Ook: *mi vestis min per ili.* 7) Ook: *havas.* 8) Niet: *lia.* Men moet zo'n zin eerst ontleden: gezegde: *amasigis,* onderwerp: *li,* bepaling zonder voorzetsel: *ĝin,* bep. met voorzetsel: *dum sia tuta vivo.* Het betreft hier natuurlijk het leven van het onderwerp; dit is derde persoon, dus *sia.* 9) Niet mooi is: *dum sia vivado.* 10) Ook: *kolektis.* 11) Ook: *ĉiu rajtas voĉdoni.* 12) Niet: *pendi.* Het werkwoord „hangen" wordt in het Nederlands zowel overgankelijk als onovergankelijk gebruikt: „die jas hangt daar goed" en: „hang die jas aan de kapstok"; dit komt in Esperanto niet voor. Een werkwoord is in Esp. òf overgankelijk, òf onovergankelijk. *Pendi* is onovergankelijk, dus: *la jako pendas.* Moet men dit w.w. overgankelijk gebruiken, dan maakt men het overgankelijk met het achtervoegsel *ig,* dus: *mi pendigas la jakon.* 13) Niet zonder richtings-*n.* 14) Niet: *li;* het geslacht komt niet ter sprake. 15) Niet geheel juist als vertaling van „streek" is *ĉirkaŭaĵo,* waarmee „omgeving" bedoeld wordt. 16) Ook: *restis.* 17) Niet zonder *n;* hier heeft men met een rechtstreekse bepaling te doen.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Opgave 7. Vertaal de hieronder volgende spreekwoorden door gelijkwaardige, gangbare Nederlandse spreekwoorden.
De tussen haakjes geplaatste spreekwoorden hebben een betekenis, die gelijk is aan het eerste gegeven.

1. Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. 2. Komenco bona — laboro duona. (Unua paŝo iron direktas. Plej granda potenco kuŝas en la komenco.) 3. Neleĝe akirita, ne estas profita. (Kiel akirite, tiel perdite.) 4. Servo postulas reservon. 5. Por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo. 6. Kiu domaĝas groŝon (Groschen, geldstukje van geringe waarde), perdas la tutan poŝon. (Kiu groŝon ne honoras, eĉ duongroŝon ne valoras.) 7. Post sufero venas prospero. 8. Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron. 9. Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas. 10. Kia reganto, tia servanto. 11. Vivu stomako laŭ stato de l' sako. 12. Inter la blinduloj reĝas la strabuloj. 13. Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas. 14. Ĵeti perlojn antaŭ la porkojn. 15. Vazo rompita longe sin tenas. (Senfortuloj longe vivas.) 16. Kio fariĝis, jam ne refariĝos. (Kio pasis, ne revenos.) 17. Kiu bati deziras, trovas bastonon. 18. Du militas — tria profitas. 19. Homo proponas, Dio disponas. 20. Koro tro plena — buŝo parolas. (Koro pleniĝas — lango moviĝas.) 21. Granda nubo, malgranda pluvo. 22. Unu ovo malbona tutan manĝon difektas. (Unu fava ŝafo tutan ŝafaron infektas.) 23. Barelo malplena sonas plej laŭte. (Kiu nenion valoras, plej multe sin gloras.) 24. Kiu bojas, ne mordas. 25. Okazo kreas ŝteliston.

(El „Proverbaro Esperanto" de D-ro L. L. Zamenhof).

Vertaling van opgave 6.

1. Alberto Hahn estis unu el la plej bonaj karikaturistoj (karikaturdesegnistoj). 2. Desegnita portreto pri (de) lia patro pendis sur la muro. 3. Neniam subskribu dokumenton, kies enhavo estas neklara (nekomprenebla) al vi. 4. La kesto estis signita (markita) per p. 5. Ne tiom bruu (ne faru tiom da bruo), oni ne povas aŭdi siajn proprajn vortojn. 6. Nenie oni estas tute sendanĝera; ĉiaj danĝeroj ĉiam minacas nian vivon. 7. Ŝi naskis belstaturan filinon. 8. Vigleco kaj movemo signas (karakterizas) la junaĝon. 9. Li atingis la 82-jaran aĝon. Liaj vivo kaj laborado estis dediĉitaj al la bonfarto kaj feliĉo de liaj proksimuloj (kunvivantoj. 10. Post vigla diskut(ad)o oni akceptis la estraran proponon (proponon de la estraro). 11. Ŝparante li sukcesis havigi al si malgrandan kapitalon. 12. Protektu la bestojn, indulgu la birdojn. 13. Frakcio konsistas el numeratoro kaj denominatoro. 14. Ĝustatempe riparu tiun rompon en via biciklo, por ke ne okazu al vi akcidento (malfeliĉo). 15. Hernio, ŝipromp(iĝ)o, bankroto.

Dem.: Se „po" estas adverbo, ĉu ne necesas diri „pomurdi milione" anstataŭ „murdi pomilione"?
Resp.: Kial? Logike „po" estas adverbo, kvankam praktike oni konsideris ĝin ĉiam prepozicio. Tio tamen neniel influas ĝian uzadon afiksan, kaj „pomilione" estas nepre korekta. „Pomurdi milione" impresus konfuze.

Dem.: Ĉu „sia" aŭ „ŝia" en la frazo „Li rakontis al ni pri ŝia falo de sia (ŝia) biciklo?
Resp.: „Falo" enhavas logikan subjekton (ŝi falis de sia....). Pro tio: „....falo de sia biciklo."

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 11. Vertaal in Esperanto:

Prof. van Dyk vertelt in het voorwoord van zijn boekje over Socrates de volgende anecdote:

Een schoolopziener bezocht een school, waar ook „gedaan" werd aan vaderlandse letterkunde. Aan een van de jongens vroeg hij: „Zeg me eens, wie heeft de „Lucifer" geschreven?" De jongen wist het niet en dacht waarschijnlijk dat er iets onbehoorlijks met lucifers was gebeurd. Hij antwoordde: „Ik weet het niet, mijnheer, ik heb het niet gedaan". De schoolopziener gebruikte het tweede ontbijt bij de burgemeester der plaats. Hij vertelde van zijn wedervaren op school, van de jongen, wie hij vroeg: wie heeft de Lucifer geschreven en het antwoord: Ik weet het niet, ik heb het niet gedaan. „Nu", zei de burgemeester, „houd het er maar gerust voor dat hij 't gedaan heeft, hoor!" 's Avonds, op weg naar huis, ontmoette de schoolopziener in de trein een lid der Provinciale Staten, die hij kende. Hij vertelde natuurlijk van het geval met de jongen en de burgemeester. Het Statenlid antwoordde: „O, kende u die burgemeester niet, die man heeft geen flauw besef van muziek".

Vertaling van opgave 8.

POSTSIGNOJ[1]) DE DIO.

Franca sciencisto[2]) rajdis[3]) kun kelke da araboj tra la dezerto. La estro neniam preterlasis je difinitaj[4]) tempoj iri de sia kamelo kaj surgenuiĝi en la varmega(n) sablo(n). Fine, iun vesperon[5]) kiam la estro[6]) ekstaris[7]) post sia preĝo, la sciencisto ne povis ne[8]) moke demandi al li: „Kiel vi tiom certe[9]) scias, ke ekzistas[10]) Dio?" Mirante[11]) la arabo rigardis la sciencisto dum momento[12]) kaj tiam serioze[13]) parolis: „Pro kio mi sciis, ke hieraŭ vespere pasis homo kaj kamelo preter mian tendon? Ĉu mi ja vidis per la signoj en la sablo?"
„Jes, tio estas ja[14]) klara", estis la respondo.
Post tio[15]) la praloĝanto de la dezerto montris la sunon, sendantan[16]) siajn lastajn radiojn super la dezertan vastan ebenaĵon kaj parolis kun solena tono: „Jen, postsignoj ne de (iu) homo!"

1) Ook: *piedsignoj* of *paŝosignoj*, hoewel men in dit geval eigenlijk niet kan spreken van *voet*sporen. *Spuro* is niet officieel. 2) Ook: *scienculo, instruito*. In *instruitulo* zijn „ito" en „ulo" pleonasmen. Ze duiden immers beiden een persoon aan. 3) Niet: *veturis*. 4) Ook: *certaj*. 5) „Op een avond" betekent: op zekere avond. De tijdsbepaling staat in de 4e naamval, doch kan ook met „je" vertaald worden. 6) De vertaling met „li" is niet geheel duidelijk, daar de eerste indruk is, dat het pers. voorn. woord slaat op het daarop volgende: *la sciencisto*. 7) Niet: *starinte*, omdat het onderwerp van de hoofdzin niet hetzelfde is. 8) Een veel gebezigde vorm, die door de dubbele ontkenning nadruk legt op de bevestiging. 9) „Toch" wordt niet vertaald. 10) Beter dan het nietszeggende: *estas*. 11) Ook: *kun miro*. 12) *Momenton* mag ook, doch dan volgen twee „rektaj komplementoj" direct op elkaar. 13) Als bepaling van gesteldheid met *a: estante serioza li parolis*. 14) Dit kan men niet letterlijk vertalen. 15) „Toen" kan betekenen: te zelfder tijd of „daarna". 16) Niet: *sendante*, wat zou slaan op de arabier.

Dem.: Mi trovas sensenca la emon fari diferencon inter „ĝis revido" kaj „ĝis la revido", ĉar praktike la pli ĝusta formo estas tamen malfacile elektebla.
Resp.: Tio ne gravas. Ni supozas, ke neniu, dezirante tiel adiaŭi, antaŭe pese pripensas siajn parolojn. La diferenco tamen ekzistas; ni do havas pli ol ni praktike bezonas. Ĉu tio estas motivo por plendi?

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

H. Velthove.

Wim: In figuur I staat de zuiger even over het bovenste dode punt.
Onderw.: Wat is een dode punt?
Wim: Als de drijfstang en kruk in elkaars verlengden liggen.
Onderw.: Maar hoe krijgt de zuiger de krukas dan aan het draaien?
Wim: Dan verdraaien we de as even.

Onderw.: Moet je dan elke keer, als de kruk in zijn dode punt komt, de as met de hand verdraaien?

Wim: Neen, maar als de motor op toeren is, dan vliegt ie wel door zijn gang door het dode punt heen.
Onderw.: Niet helemaal juist. Andries, zeg jij het maar.
Andries: De massa van het vliegwiel zorgt, dat de kruk steeds over het dode punt heen komt en geeft tevens een gelijkmatige gang aan de krukas.
Onderw.: Mooi zo. Nou Wim, ga eens verder.
Wim: In figuur I is de inlaatklep geopend. De zuiger gaat naar beneden. De ruimte boven de zuiger wordt groter, zodat het gas langs de klep G aangezogen wordt.
Onderw.: Wat voor gas?
Wim: Een mengsel van lucht en benzine.
Onderw.: Dus eigenlijk geen gas. In het spraakgebruik heeft het echter de naam gas gekregen. Ga maar verder.
Wim: In figuur II gaat de zuiger omhoog, terwijl de inlaatklep is gesloten. De zuiger perst het gas samen en als de kruk in figuur III even over het dode punt is, dan springt er een electrische vonk over tussen de twee pennetjes van bougie J. Het gas ontploft, waardoor de zuiger omlaag gedreven wordt.
Onderw.: Wat wil dat eigenlijk zeggen: Het gas ontploft?
Wim: Dat het benzine-luchtmengsel verbrandt. Na de verbranding blijven er gassen over, die een hoge temperatuur hebben en daardoor een hoge druk. De gassen willen uitzetten en drukken dus de zuiger omlaag.
Onderw.: Klaas, ga jij eens verder.
Klaas: De zuiger gaat nu omhoog (figuur IV), terwijl klep H is geopend. Het gas wordt nu langs deze klep naar buiten gedreven door de nog aanwezige hoge druk, terwijl de zuiger in zijn opwaartse gang de rest er uitdrijft en dan begint het spelletje weer opnieuw.

Vilh.: En figuro I la piŝto troviĝas tuj preter la supra inversiĝa punkto (pozicio).
Instr.: Kio estas inversiĝa punkto?
Vilh.: Se la transmisia stango kaj kranko formas unu rekton.
Instr.: Sed kiel la piŝto tiukaze sukcesas turni la krankŝafton?
Vilh.: Tiukaze oni iom turnŝanĝu la pozicion de la ŝafto.
Instr.: Ĉu oni do ĉiun fojon, kiam la kranko venas en la inversiĝan punkton, mane devas turnŝanĝi la pozicion de la ŝafto?
Vilh.: Ne, sed kiam la motoro funkcias plenrotacie, ĝi turniĝas pro sia rapideco preter la inversiĝan punkton.
Instr.: Ne tute ĝusta. Andreo, vi diru do.

Andreo: La maso de la inertrado zorgas, ke la kranko ĉiam venas preter la inversiĝan punkton kaj samtempe kaŭzas regulan rotacion de la krankŝafto.
Instr.: Bone tiel. Nu Vilhelmo, daŭrigu vi.
Vilh.: En figuro I la enlasvalvo estas malfermita. La piŝto malsupreniĝas. La spaco super la piŝto grandiĝas, tiel ke la gaso estas ensuĉata preter la valvon G.
Instr.: Kia gaso?
Vilh.: Miksaĵo el aero kaj benzino.
Instr.: Do, fakte ĝi ne estas gaso. Tamen, la parolata lingvo donis al ĝi la nomon gaso. Daŭrigu.
Vilh.: En figuro II la piŝto supreniĝas, dum kiam la enlasvalvo estas fermita. La piŝto kunpremas la gason kaj kiam la kranko en figuro III estas tuj preter la inversiĝa punkto, tiam transsaltas sparko inter la du vergetoj de la sparkilo J. La gaso eksplodas, pro kio la piŝto puŝiĝas malsupren.
Instr.: Kio fakte esprimiĝas per: la gaso eksplodas?
Vilh.: Ke la benzin-aermiksaĵo bruliĝas. Post la bruliĝo restas gasoj, kiuj havas altan temperaturon kaj pro tio altan premon. La gasoj ekspansiemas kaj sekve puŝas la piŝton malsupren.

Instr.: Nikolao, daŭrigu vi.
Nik.: La piŝto supreniĝas (figuro IV), dum kiam valvo H estas malfermita. Pro la ankoraŭ estanta alta premo la gaso nun puŝiĝas eksteren preter ĉi tiun valvon, dum kiam la piŝto, suprenirante, elpuŝas la reston kaj tiam la ludo denove komenciĝas.

TRA NIA LITERATURO

UNUA VOJAĜO ĈIRKAŬ LA MONDO.

Prof. Agostinho da Silva, trad. J. Rodrigues.

En la maja numero de L.P. ni esprimis bedaŭron, ke verkantoj kaj tradukantoj ĝenerale tiom malmulte metas sian verkon sub la juĝon de iu kompetenta kontrola instanco. Kaj jen, kiel agrabla surprizo nin atingis la suprenomita libreto, kontrolita de la Literatura Komitato de F.L.E.
La makuloj en la traduko estas nun malmultaj kaj nenie ni trovis ĝenajn lingvaĵojn. Korektaj estas ekz. laŭ ni: *en la jaro 1517a* (kun adjektiva finaĵo), *Karlo Va* (sen artikolo), *nomita* (anstataŭ *nomata), dum kiam* kaj *ĝis kiam* (kun tempa konjunkcio), *tiom malsamaj* (anstataŭ *tiel).*
Kritikindaj estus: *mirinda* (4) *(miriga) Bonespero (4) (Bona Espero)* kaj kelkfoje *tiu,* kie la nura artikolo sufiĉas: *ili atakis tiun (la) ŝipon* (14) *flankfali* (17) *(flankenfali), navigado* (4) kaj aliloke: *navigacio* (3).
La malmultajn nekonsekvencaĵojn ni atribuu al preterrigardo:
La sklavo Henriko (7) — *Manuel la* (3); *proksime de* (11) — *proksime al* (17); *pli ol 200 homoj mortis dum* (?) *la vojaĝo* (23).
Notindaj estas:
kilogram-miloj da mielo (8); *la kanonoj salvis salute* (16); *nenia ekstera indico denuncis la emocion* (11); *ĉiutage la maro englutis kadavron* (17); *antaŭ ol la hispanoj povis plani reziston* (18); *la ŝipkorpo, kiun frapadis ĉiuj maroj de la terglobo* (23).
La 23-paĝa libreto, kiu pritraktas paĝon el la hispana historio de 1519a, estas interesa kaj instrua kaj ni povas rekomendi ĝian legadon. J. van Scheepen.

KVARA RAPSODIO.

Eldona Societo Esperanto, Stockholm.

Ĉiun libron ni povas rigardi laŭ du flankoj, nome laŭ ĝia enhavo kaj laŭ ĝia lingva valoro. Ĉar en nia gazeto estas nia tasko atentigi la lernantojn pri ĉiuj lingvaj problemoj, ni reliefigas la trovitajn rimarkojn, por ke la lernantoj lernu diferencigi la bonajn kaj malbonajn formojn. Kvankam ĉe severa kritikado oni ofte trovas multegon por priparoli, oni ne konkludu el tio, ke tiam tia verko ne valoras la legadon. Kontraŭe eĉ plurfoje oni komprenos, ke per la legado oni gajnis ion. La supre nomitan verketon mi legis kun plezuro kaj inter la artikoloj de diversaj konataj aŭtoroj ni trovis interesajn kaj vere instruajn. Sed inter diversplumaj birdoj troviĝas ja ankaŭ malpli belaj. *Servmaristo* ekzemple estas pezastila.
En preskaŭ ĉiu verko enŝoviĝas kontraŭaj al si formoj; kaj tiom pli multe, se verkis pri ĝi pli ol unu homo. Tiajn ni trovis i.a.: *sinokupo* (4) kaj *memamo* (39), *mirinde* (7) kaj *miriga* (19), *aspekti strange* (9) kaj *aspekti malgaja* (9), *Jezuo* (30) kaj *Jesuo* (37).
Ne bona estas la frazo *la respekto de la vivo,* Ni povas paroli pri la respekto *de iu* antaŭ la vivo (4). En la frazo *ĝi aperas jen du jarojn post la 3a,* la vorto *jen* estas neklara. *Admiralino* estas konciza formo por *admirala edzino* (14). Ni renkontis tian formon jam ĉe St. Engholm en „Gösta Berling".
Naciismo *ŝajnas ĵurnalistoj alparolas (= pri-) la problemon* (4). Kial *kataklizmo* kun *z?* (laŭ P.V. *s*) (4). *Morna* (28), *fragila* (29), *duro* (29) kaj *cenzoro* (33) estas neologismoj, kiuj ankaŭ ne troviĝas en P.V.
Ne klarstilaj estas *ke tia ordono troviĝas en si mem, ne povas motivi kaj defendi sin* (4); *la junan ĉarman admiraledzinon kaŝe simple li malamegis* (15); *anstataŭ taŭzi je harligoj tiun „blankan pigon"* (15); *li sin tenis kun malgaja respekto, konanta disciplinon ŝipano* (15); *fariĝos certe butero ĝis mi revenos* (27) Kaj poste? Tipaj estas *ŝio kaj lio* (hij en zij) (20); *nura(j) haŭto kaj osto* (36); *li ne sukcesis kunmeti ion kompreneblan el la vortĉifonoj* (47).

J. van Scheepen.

Baldaŭ aperos:
ESPERANTO 60-JARA, skizo pri la evoluo de la lingvo en la literaturo, de G. J. Degenkamp; prezo (broŝ.) f 1.30, (karton) f 1.75.
Libro servo, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

„ESCEPTE DE" AŬ „KUN ESCEPTO DE".

„La ĉefaj eraroj estas intermikso de verbotempoj sur p., 7 kaj la formo *escepte de* anst. *kun escepto de.* Mi precipe aludas tiun lastan, ĉar en la nuna tempo tre multaj Esperantistoj ŝajne ne perceptas, ke inter la du estas granda diferenco de signifo". Per la ĉi supra kritiko, citita el recenzo pri „Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo", M.S. havigas en „Esperanto" de I.E.L. al ni, „nuntempaj esperantistoj" valoran instruon pri la aplikado de la t.n. prepoziciaj komplementoj. Ĝis nun ni uzis paralele: *escepte de — kun escepto de, rilate al — kun rilato al, helpe de — kun la helpo de, atente al — kun atento al* k.s. Ni ĝojas, ke s-ro M.S. atentigas pri la granda diferenco inter ambaŭ kategorioj, kiun ni ne perceptas. Sed eĉ pli ni ĝojus, se s-ro M.S. instruus al ni, en kio konsistas tiu diferenco. Aŭ ĉu li nur silentis pri tio, supozante, ke ni tamen ne perceptos? Se tiel estas, do bone; li silentu plu, kaj ni trankvile daŭrigu la uzadon de *escepte de* kun la signifo *kun escepto de,* ĉar tamen neniu perceptos la diferencon!
Sed pale ni konjektas, ke M.S. vidas en *escepte de* la signifon de *esceptite de.* Se nia konjekto ĝustas, M.S. trankvilu, ĉar eĉ „nuntempaj esperantistoj" en *escepte de* ne divenas *esceptite de.* Se la lastan signifon ili celas, ili ne skribas: *escepte de.*
Pri la ĝusteco de *escepte de* ili krome trovas pravigon en P.V. kaj P.G.
Samvalora estas lia kritiko pri la verbotempoj, en kiuj ni ne trovis erarojn. Supozeble ni ne tiom flarnaze esploris la paĝon kiom la „aliatempa" esperantisto M.S.
Kun trankvila konscienco ni povas rekomendi librojn, en kiuj tiaj subtile perceptemaj recenzantoj kia s-ro M.S. trovis nur tiajn ĉefajn erarojn!

ĈU LA VORTO „NUN" NEPRE POSTULAS ESTANTAN TEMPON?

En la sama recenzo s-ro M.S. kritikas: „La tradukinto plurfoje uzas *nun* kun *-is,* formon kiu estas uzata en iuj naciaj lingvoj, sed kiu ne konformas al la logika strukturo de Esperanto".
Laŭ tiu rezono *nun* ne taŭgas en la frazo „Frue en la vespero la sukceso de la festeno estis evidenta kaj nun ĉio iris bone kaj kontentige por gastoj kaj gastigantoj". Ni permesas al ni nomi la rezonon de M.S. erara. Li ne atentis, ke la estanta senco de *nun* ne estas absoluta, sed relativa, ĉar dependanta de la tempo, en kiu oni parolas. *Nun* en la citita frazo estas bone uzita. Tio estas trankviligo por ni, sed ankaŭ por M.S., ĉar la frazon ni trovis en.... „La virineto en bluo", pĝ. 16, verkita de M(ason) S(tuttard)! Fine, se la strukturo de Esperanto estus efektive tiom rigora, s-ro M.S. ne devus skribi: „La tradukinto uzas". Nepre logike tradukinto nur uzis.

Dem.: En „La Malgranda Johano" troviĝas la frazo „Esplorulo montris al li la plej malgajan, la plej malnoblan, la plej vulgaran".
Tiun adjektivan formon mi malaprobas. Zamenhof uzis por la abstraktaĵoj „het goede, het schone": „la bono, la belo". Ne estas logike uzi por la superlativo adjektivan formon, kvankam estas malfacile solvi la aferon, ĉar la adverbo „plej" ne povas esti uzata ĉe substantivo. Ĉu ekzistas alia solvo?
Resp.: Efektive ekzistas. „La plej malgaja" = „de droevigste...." kaj ni subkomprenas iun substantivon, sed kiel traduko por „het droevigste" tiu formo logike ne taŭgas. Laŭ ekzemplo de Zamenhof oni uzu substantivojn: „la belo, la bono, la malgajo". Kaj, ĉar oni ne povas diri „la plej malgajo", oni diru unuvorte „la plejmalgajo", analogie al „la plimulto, la plejmulto".
Laŭ opinio de René de Saussure krome ekzistas subtila diferenco inter „het goed, het kwaad" (la bono, la malbono) kaj „hĕt goede, het kwade". Por traduki ĉi lastajn ideojn li rezonas jene:
En la esprimo „het schone" la artikolo havas kvazaŭ substantivan sencon (pro kio iuj aŭtoroj jam skribis „tio bela"), do proksimume: „het schone *het,* het schone *iets*". Nu, artikolo estas parenca al adjektivo, ĉar same kiel adjektivo ĝi estas aldonata al substantivo. Kaj same kiel adjektivo ĝi finiĝas per „a". Same kiel ĉe adjektivoj oni povas forpreni tiun a-finiĝon. Kial ni, same kiel ĉe adjektivoj ankaŭ ne povus anstataŭigi tiun „a" per „o"?
La rezulto estus: „la — l' — lo", same kiel „bona — bon' — bono". Ni do akirus substantivan artikolon, kaj la solvo estus" het schone, het droevige, het droevigste = lo bela, lo malgaja, lo plej malgaja".
Ni ne volas rekomendi tiujn formojn, sed konsiderindaj ili certe estas, kaj neniel kontraŭfundamentaj!